

Esperanto

I-14621(87
(1990)

EK

11-12/1990



REVUO
FONDITA
EN JARO 1903

OFICIALA ORGANO
DE I.K.U.E.
INTERNACIA
KATOLIKA UNUIGO
ESPERANTISTA

espero katolika

JARKOLEKTO 87 - N. 832-833 NOVEMBRO-DECEMBRO 1990

Sur la kovrilo: Naskiĝo de Jesuo, kataluna verko de la 12-a jarcento (Muzeo pri Kataluna Arto en Barcelono, Hispanio).

Foto Rudolf Skoruppa.

Karaj Legantoj!

jen en viaj manoj la lasta numero de EK por la jaro 1990. Tamas pri escepte ampleksa kajero, kiu kompletigas la planitajn (kaj promesitajn) 200 paĝojn por la kuranta jarkolekto.

Ni decidis aperigi unu solan, tre ampleksan kajeron, anstataŭ du kajerojn kun sama kvanto da paĝoj, precipe por iom ŝpari el la sendaj elspezoj (afranko kaj kovertoj), kiuj fariĝis tiel enormaj, ke ili multe superas la koston mem de redaktado kaj presado de la revuo.

Ni varme petas, ke oni bonvolu akurate pagi la kotizon 1991 (laŭ la tarifoj en la lasta paĝo), kaj ke oni tuj informu nian Centran Oficejon en Romo pri la farita pago (ankoraŭ en oktobro 1990 ni ne havas tute kompletan bildon pri la pagintoj por 1990!). Frua pago ne estas peza ŝarĝo por la paganto, sed fariĝas granda avantaĝo por IKUE, kiu tiel ŝparas monon kaj tempon alie bezonatan por respondi kaj admoni, kaj povas ĝui la tutan valoron de la kotizo (pago farita nur ĉe la fino de la koncerna jaro estas devalutita almenaŭ 7% kompare kun tiu farita frue en januaro).

Bonan legadon, kaj jam nun Feliĉan Kristnaskon kaj Pacan Novjaron!

La Redakcio

Nova telefona numero de la Centra Oficejo: (06) 70.00.323

Periodico culturale mensile - Gruppo III
pubbl. inf. 70% - Gratis ai soci
Monata kultura gazeto

I. K. U. E.

INTERNACIA KATOLIKA UNUIĜO ESPERANTISTA

Honora Prezidanto:

Sac. Alfons Beckers
Rozenlaan, 5
B - 3950 Beringen (Belgio)

Prezidanto:

Sac. Duilio Magnani
viale C. Zavagli, 73
I - 47037 Rimini/Forlì, Italio

Unua Vicprezidanto: Sac. Lajos Kòbor,
H-9484 Pereszteg, Hungario

Dua Vicprezidanto: Sac. Franjo Gruič, Strossmayerov
trg 5, YU-54400 Djakovo, Jugoslavio

Sekretario-Kasisto:

Antonio De Salvo

Estraro:

A. Beckers, A. Casey, A. Ciccanti, R. Degrelle, A. De Salvo, R. Forycki, F. Gruič, L. Kòbor, J. Kondor, J. Korytkowski, B. Pochanck, R. Ruaro, S. Szénási

Plenumkomitato:

Aŭstrio: Mudrak; *Belgio:* Poterucha; *Ĉeĉoslovakio:* Dlugi, Švaček; *Francio:* Bourdon; *Germanio:* Eichkorn; *Hispanio:* Casanoves; *Hungario:* Kaszab; *Italio:* Cadei; *Jugoslavio:* vakas; *Nederlando:* Smits; *Pollando:* Kos; *Svislando:* Bommer; *Usono:* Laughery

Centra Oficejo:

Via Berni, 9
I - 00185 Roma (Italio)
tel. (06) 70.00.323
poŝta konto 23290000
Direktoro: Antonio De Salvo

Oficiala organo:

Espero Katolika

Kotizo: 32 svisaj frankoj aŭ egalvaloro

Registriĝo ĉe la tribunalo de Romo
(Registrazione presso il Tribunale di Roma)
n. 17138, 11-2-1978

Respondeca Direktoro (Direttore Responsabile):

Antonio De Salvo
C.P. 4017 Appio, I-00100 Roma RM, Italio
tel. (06) 78.10.782 (vespere)

Redaktararo: Sac. Battista Cadei, Antonio De Salvo

Presejo (Tipografia):

ROTATORI
Via Labicana, 29 - Roma

**FELIĈA ESTAS TIU,
KIU SPERTAS LA PARDONON
DE LA ETERNULO****Medito al la 32-a psalmo**

- 1 *Feliĉa estas tiu, kies krimo estas pardonita, kies peko estas kovrita.*
- 2 *Feliĉa estas la homo, al kiu la Eternulo ne kalkulas lian kulpon
Kaj en kies spirito estas nenia malvero.*
- 3 *Kiam mi silentis, miaj ostoj senfortiĝis
De mia ĉiutaga ploregado.*
- 4 *Ĉar tage kaj nokte pezis sur mi Via mano;
La freŝecon de miaj suktoj anstataŭis sekeco de somero.*
- 5 *Mian pekon mi konfesis al Vi, kaj mian kulpon mi ne kaŝis;
Mi diris: Mi konfesos miajn krimojn al la Eternulo;
Kaj Vi deprenis la kulpon de mia peko.*
- 6 *Pro tio preĝu antaŭ Vi ĉiu piulo en favora tempo,
Por ke ĉe la disverŝiĝo de grandaj akvoj ili lin ne atingu.*
- 7 *Vi estas mia ŝirmo;
Kontraŭ sufero Vi min gardos,
Per kantoj de savo vi min ĉirkaŭos.*
- 8 *Mi prudentigos vin, kaj montros al vi la vojon, kiun vi devas iri;
Kun konsiloj Mi direktos sur vin Mian okulon.*
- 9 *Ne estu kiel ĉevalo, kiel senprudenta mulo,
Al kiuj oni devas kateni la buŝon per brido kaj buŝpeco,
Alie ili ne venos al vi.*
- 10 *Multajn frapojn havas la malpiulo;
Sed kiu fidas la Eternulon, tiun ĉirkaŭas favoro.*
- 11 *Ĝoju pro la Eternulo, kaj gaju, ho justuloj;
Kaj triumfu ĉiuj, kiuj havas pian koron!*

La psalmo 32 estas laŭd-kanto de homo, kiu spertis la pardonon kofavoron de Dio, kiu spertis la liberigan forton de konfeso kaj pardono.

“Kiam mi silentis, miaj ostoj senfortiĝis”, rakontas la psalmisto.

Ĉu ne ankaŭ ni spertis sufiĉe ofte tion: ni fariĝis kulpaj kaj ne estas pretaj konfesi nian kulpon, nian eraron. Pro tio ni estas deprimitaj, malgajaj. En ni mem bataladas nia konscienco kontraŭ nia fiero. La konscienco volas al ni montri nian eraron, nian pekon kaj diras nin: *Konvertiĝu! Konfesu! Petu la pardonon!* Sed samtempe nia fiero serĉas la kaŭzon por nia fiasko en la aliaj, en la cirkonstancoj, ekstere de ni. Sed ĉi tiu batalado en ni kostas multe, multege da fortoj. Se finfine la konscienco venkas kaj ni kuraĝas konfesi nian pekon, nian kulpon kaj ni petas la pardonon de ofendita homo, aŭ de Dio, ni estas liberigitaj kaj ĝojo kaj paco revenas al ni.

La 8-a kaj 9-a versikloj montras al ni, kial la piulo de psalmo estas preta konvertiĝi, reiri al Dio. La Eternulo mem gvidas lin por ke li vidu la rektan vojon.

Estas la situacio, kiun Jesuo priskribas dirante pri si: *“La Filo de homo venis por serĉi kaj savi la perditaĵon!”* (Luk 19,10). En Jesuo montras la Patro al ni la vojon al nia savo; Jesuo ja estas *la vojo, la vero kaj la vivo!* Nur en Li kaj per Li ni trovas la veran vojon al la konvertiĝo kaj al la pardonema kofavoro de la ĉiela Patro.

Fratino Theotima Rotthaus, Germanio

LA HELPO DE DIO

En senhoma preĝejo, pastro ekvidis virinon sidanta kun la kapo inter la manoj.

Forpasis unu horo, du horoj, kaj ŝi ankoraŭ sidis tie.

Opiniante, ke temas pri kriza animo, kaj dezirante alporti konsolon, li proksimiĝis al la virino kaj diris: *“Ĉu mi povas doni al vi helpon?”*

“Ne, dankon, patro,” ŝi respondis, *“mi jam estas ricevanta la helpon, kiun mi bezonas”*.

REMALFERMO

DE PREĜEJO EN UKRAJNIO

“ Sonas sankta Meso, sonas ploroj de la homoj, brilas suno super la preĝejo de Sankta Bartolomeo ... ” Tio okazas hodiaŭ, sed jen fragmento de ĝia historio:

La sankt-Bartolomeo-preĝejo ne havas certan daton de naskiĝo, sed dokumentoj datitaj je la 1392-a jaro informas, ke reĝo Vladislavo rajtigis konstruon de preĝejo en Drogičov. En la preĝejo ni vidas veran barokan stilon kun muroj kovritaj per belaj freskoj. Supre pendas pentraĵo de la Patrino de Dio, kies aŭtoro estas Dolabelli el Italio.

Komenciĝis la sovetaĵoj, kaj la preĝejo estas fermita. Poste oni alikonstruis la preĝejon al ... (drole estas diri ĉi tiun vorton) popola muzeo pri ateismo kaj religio. Kredantoj luktis, sed tiuepoke en la lando ĉio estis malpermesata.

Finfine freŝa vento komencis trablovi Ukrainion. Jen historia tago: post longa batalado ni konstatis, ke la preĝejo estas popola sankta domo kaj devas servi al homoj.

“ Sonas sankta Meso, sonas ploroj de la homoj, brilas suno super la preĝejo de Sankta Bartolomeo ”.

El Pollando venis pastro kiu celebris unuan sanktan meson. Ankaŭ ni ricevis el Pollando donacojn kaj varmajn bondezirojn je la nomo de la polaj katolikoj. Nun estas tempo, kiam ni povas vere diri, ke Sankta Bartolomeo denove komencas servi al ni. Multe da laboro atendas drogičovanojn, sed sonas sankta muziko, jam postmorgaŭ ni ekaŭdos ĝin denove - ja per orgeno ludos s-ino Erĵebet, ŝi estas vera esperantistino.

Pastro Kazimej Monĉynsky gvidas sanktan meson, kaj nun dum malfacila tempo ni staras en la preĝejo kaj diras mallaŭte: Dank'al Dio ni kunvenis ĉi tien; estu nia pastro kiel peranto inter Dio kaj ni.

Leon Kolesnikov, Drogičov, Ukrainio

GRAVAJ SANGOJ ANONCIĜAS (jaroj 1400 - 1499)

Religia krizo

La Granda Skismo de Okcidento finiĝis en 1417 per agnosko de Marteno la 5-a kiel ununura papo. Sed la papa aŭtoritato jam ne plu estis sen-diskuta, kiel pruvas (ekzemple) la ribelo de la ĉeĥa Johano Hus, pastro filozofo kaj teologo de la universitato de Prago. Li akre denunciis la riĉaĵojn de la pastraro, kaj deklaris, ke la suverenoj rajtas sekularigi (= konfiski) la ekleziajn posedaĵojn. Rilate la kredon li instruis, ke ties ununura bazo estas la Biblio: la tradicio estas nur normo, la unuarangeco de la papo estas mensogo de Antikristo, kaj la tuta pastraro estas agentoj de la diablo. En la kristana kredo Hus forigis la sakramentojn de pekconfeso, konfirmacio, kaj sanktoleado; li kondamnis la kul-ton al la sanktuloj kaj la indulgencojn.

Reage al tio, papo Inocenco la 7-a ordonis al la ĉefepiskopo de Prago malpermesi ke Hus prediku, sed tio nur plialtigis lian prestiĝon. Johano Hus volis prezenti sin al la Koncilio kunveninta en Konstanco. Li ja konsciis, ke se li ne konvinkos la asembleon de la katolikaj episkopoj, li pereos. Fakte la Koncilio kondamnis lin kiel herezulon, kaj li estis bruligita sur ŝtiparo en 1415.

Politika krizo

En Mezepoko regis unueca religi-politika koncepto. Super ĉio estas Dio, kiu donis aŭtoritaton al la apostolo Petro kaj al lia laŭvica posteulo (= la papo). Ĉi tiu devas gvidi la kristanaron en unueco: senpere koncerne religion, per la imperiestro koncerne politikon.

En la 15-a jarcento ĉi tiuj konceptoj iom post iom senvalidiĝas. Nacioj kiaj Francio kaj Anglio akiras propran identecon, kaj certe ne sentas sin subordigitaj al la imperiestro. En Italio kaj Germanio mankas politika unueco, sed diversaj urboj (ekz. Venecio, Florenco, kaj respektive Kolonjo, Hamburgo, Aŭgsburgo) havas propran politikon, ekonomian rolon, kulturon, artan floradon, kaj certe ne volas obej papon aŭ imperiestron.

Brilaj kaj mizeroj de la papeco

En Romo la papoj protektis la kulturon kaj la artojn. Tiu artisma movado, kiu nomiĝas Renesanco, havis sian centron en Romo. Tien la papo alvenigis arkitektojn skulptistojn, pentristojn, oraĵistojn, poetojn el Italio, Fran-

cio, Germanio, Hispanio. Ni menciuj nur Mikelanĝelon, kiu interalie freskis la plafonon de la « Siksta Kapelo ». Romo fariĝis belega urbo. Papo Nikolao la 5-a (1447-1455) planis rekonstrui la bazilikon de sankta Petro tiel, ke ĝi estu la plej granda preĝejo en la mondo. Li kolektigis papirusojn, pergamenojn kaj alispecajn manskribaĵojn, kiuj konsistigos la faman Vatikanan Bibliotekon. La pres-arto, inventita de Gutembergo, tuj trovis interesigon de ekleziuloj.

Bedaŭrinde, la morala kaj kristana nivelo de la ekleziaj altranguloj malleviĝis. La papa kortego estis loko de ambicio, lukso, frivolaĵoj kaj malĉastaĵoj, ne malsimile ol la aliaj laikaj kortegoj. Plej sensacia estis la kazo de papo Aleksandro la 6-a (1492-1503). Ambicia kaj malĉasta (li naskigis naŭ gefilojn el diversaj konkubinoj), li sukcesis malgraŭ tio aĉeti la papecon. Lia filo Cezaro, konata kiel « duko Valenteno », fifamis pro sia krueleco; lia filino Lukrecia Borĝa pro siaj sinsekvaj eksgeedziĝoj... Kontraŭ tiuj skandaloj leviĝis en urbo Florenco la dominikano Hieronimo Savonarolo, kiu tamen, ĉefe pro politikaj kialoj, estis ŝtiparumita.

La Orienta Eklezio: efemera unuigo

La bizanca imperio, minacata de la Turkoj, petis helpon en Okcidento. La roma eklezio promesis helpon, sub kondiĉo restarigi unuecon inter katolikoj kaj ortodoksoj. Post longaj diskutoj, en la koncilio de Florenco, la patriarko de Konstantinopolo akceptis la deklaron ke « *la roma pontifiko estas aŭtentika posteulo de la beata Petro, unua inter la apostoloj, vera vikario de Kristo, patro kaj instruanto de ĉiuj kristanoj* ».

Sed kiam la orientaj delegitoj revenis al Konstantinopolo, la popolo ribelis kontraŭ la reunuigo, kiu do ne efektiviĝis. Post unu jaro, la 29-a de majo 1453, la Turkoj, gvidataj de Mohamedo la 2-a, konkeris Konstantinopolon. Tiel finiĝis la orienta romia imperio.

Pli vastaj horizontoj

Fine de la 15-a jarcento la kristana mondo prezentigis jene: Okcidenteŭropo estis katolika (en 1493 estis forpelitaj la Maŭroj el Granado, lasta islama regno en Hispanio). Rusio, Rumanio, Bulgario kaj Greklando estis kristanaj-ortodoksaj. En Azio, sub islamana regado, la kristanaj komunumoj malgrandiĝis. En Ĉinio la kristanismo malaperis.

Sed per la preterpaso de la Kapo de Bona Espero fare de Bartolomeo Diaz (1487), kaj la malkovro de la Nova Kontinento fare de Kristoforo Kolumbo (1492), malfermiĝas la vojoj por la evangelizado de Ameriko kaj de la negra Afriko.

Dokumento: Kazimiro, kristana reĝido (anonimulo)

Filo de la reĝo de Litovio kaj Pollando, Kazimiro (1458-1484) kondukis kiel modela kristano, kiel evidentiĝas el la ĉi-suba fragmento de biografio verkita de anonima samtempulo:

Ĉiutage li admonis sian patron praktiki justecon en la regno kaj kun la submetitaj popoloj. Kaj se foje pro malzorgo aŭ pro homa febleco okazis ia neglekto en la regado, li tute ne evitis modeste riproĉi la reĝon. La aferon de la malriĉuloj kaj mizeruloj kiel sian propran li defendis kaj ĉirkaŭprenis; pro tio « defendanto de la malriĉuloj » li estis nomata de la popolo. Kaj kvankam reĝido kaj eminenta pro nobela sango, tamen al neniu, kiel ajn humila kaj malaltranga, li montris sin malafabla. Ĉiam li volis esti kalkulata inter la spirite malriĉaj, al kiuj apartenas la regno de la ĉielo, prefere ol inter la eminentaj kaj potencaj de ĉi tiu mondo. Al la altaĵoj de homa regado li ne ambiciis, nek li volis ĝin akcepti, kiam la patro al li proponis, ĉar li timis ke per la pikiloj de la riĉaĵoj, kiujn Jesuo Kristo nomis dornoj, li vundiĝus, aŭ ke per la kontaĝo de la surteraj aferoj li infektiĝus. Ke li vivis virge, kaj ke virga li finis sian vivon, asertas kaj atestas ĉiuj liaj ĉambristoj kaj sekretarioj, viroj eminentaj kaj bonvirtaj, kiuj intime konis lian vivmanieron, kaj el kiuj kelkaj ankoraŭ vivas.

KUNMETAĴO

Mi plukis
la plumon de hirundo,
jasmenon krucan,
vergeton de olivarbo.
Ilin mi kunligis
per fadeno el espero.
Ilin mi banis
per perlo el ploro.
Ilin mi viŝis
per spiro el amo.
Ilin mi deponis
ĉe l'sojlo de eterneco.
La lastan vesperon
iu ĝin trauros.

Antonio Aversa, Italio; trad. Corrado Lepore

Granda jubileo

900 JAROJ DE NASKIĜO DE SANKTA BERNARDO DE CLAIRVAUX

Mi volas atentigi, ke ĉi-jare valoras rememorigi la faman homon de XII-a jarcento, sanktan Bernardon de Clairvaux (Klervò), ĉar pasis ĝuste 900 jaroj de lia naskiĝo. Kion oni devas scii pri li?

Bernardo naskiĝis en la jaro 1090 en kastelo Fontaine (Burgundio, Francio). Liaj gepatroj, Tecelino, riĉa kavaliro kaj Aleta havis 6 filojn kaj unu filinon, el kiuj Bernardo estis la tria, laŭvice. Kiel kapabla junulo, li ricevis bonan edukadon, precipe religian. Jam en frua aĝo li deziris sekvi Kriston. Post multaj meditadoj li decidis oferi sian vivon al servado de Dio. Post kelka tempo li aliĝis al Monaĥejo en Citeaux (Sitò) kaj fariĝis cisterciano. Lia nekutima influo faris, ke eĉ liaj fratoj, kaj poste eĉ lia patro mem iris laŭ liaj spuroj. La sankteco de Bernardo allogis multajn kandidatojn al cistercia ordeno. Bernardo mem fondis do ĉirkaŭ 70 monaĥejojn cisterciajn. Tiamaniere la abato de Clairvaux, Bernardo, fariĝis granda disvastiganto de cistercia ordeno. Cetere la monaĥejon de Clairvaux, unuan post Citeaux ĝuste li fondis, kaj estis ĝia superulo. Tio okazis en la jaro 1115. En la postaj jaroj la spiritaj filoj de Bernardo disvastiĝis preskaŭ tra tuta Eŭropo ... Oni ankaŭ devas konstati, ke Bernardo estis fama filozofo, sperta teologo, mistikulo, nomita patro kaj doktoro de la Eklezio. La surteran vivon li finis la 20-an de aŭgusto 1153. En la jaro 1174 li estis proklamita sanktulo, fare de papo Aleksandro la 3-a. Lian memoron oni solenas la 20-an de aŭgusto.



S. Bernardo (detalo de relikvujo en la Katedralo de Veroli, Italio)

Oni devas ankaŭ mencii pri granda heredaĵo, kiun li postlasis. Jen li skribis multajn verkojn: traktaĵojn, diskursojn, epistolojn, ktp.

Ĉiuj monaĥejoj de la cistercia ordeno en la tuta mondo solene festas la jubileon de sankta Bernardo per spiritaj ekzercoj, simpozioj, prezentadoj, diservoj kaj aliaj aranĝoj. La hodiaŭa homo povas multe profiti legante kaj meditante pri la vivo kaj la verkoj kaj agado de tiel fama kaj sankta persono de antaŭ naŭ jarcentoj ...

*P. Antono Gucwa, cist.,
Szczyrzyc, Pollando*

LA VERA AMO

Amo sufiĉas per si mem, ĝi plaĉas al si mem, pro si mem. Ĝi estas por si merito kaj premio. Amo ne serĉas motivojn nek avantaĝojn ekster si. Ties avantaĝo konsistas en sia ĝuo. Mi amas, ĉar ... mi amas; mi amas por ami. Ja granda afero estas amo, se ĝi revenas al sia komenco, al sia origino, al sia fonto, tie ĉerpante, por senĉese fluadi. La amo estas la ununura inter la animaj sensoj, sentoj kaj afekcioj, per kiu kreaĵo povas respondi al Kreinto, kvankam ne samnivele; kaj respondi al kunhomoj, samgrade. Kiam Dio amas, li nenion volas, krom esti amata; li ne alicele amas, krom por amiĝi, sciante, ke liaj amontoj ja beatiĝos ĝuste per tiu amo.

La amo de la Nuptulo, eĉ la Amo-Nuptulo, nur serĉas reciprokecon kaj fidelecon. Licu do al la amatino respondi per amo. Kial do la edzino,

kaj edzino de Amo, ne amu? Kial do Amo ne amiĝu?

Konvene do, rezignante ĉiajn aliajn afekciojn, ŝi sin dediĉas tute kaj nure al Amo, strebante kiel eble plej respondi per reciprokado. Verdire, eĉ se ŝi sin tute oferus al amo, neniam ĝi atingus la gradon kaj nivelon de la Amfonto. Tute ne same abundegas la amanto kaj la Amo, la animo kaj la Vorto, la edzino kaj la Edzo, la Kreinto kaj la kreaĵo. Ĉar fonto ege pli abundas, ol kiom sufiĉas por kontentigi soifanton.

Sed ĉu tio gravas? Ĉu ĉesos kaj malaperos la dezirego de la nuptulino, la suspiro



Filippino Lippi (1457-1504): Apero de la Virgolino al S. Bernardo (Florenco, Italio, Abatejo)

de sopiranto, la ardo de amanto, la fido de atendanto, pro tio ke li ne kapblas konkuri je rapideco kun giganto, je dolĉeco kun mielo, je mildeco kun ŝafido, je blankeco kun lilio, je lumbrilo kun suno, je amo kun Tiu kiu estas la Amo en si mem? Ne. Sed, eĉ se kreaĵo amas malplimulte, pro tio ke ĝi malplia estas, tamen, se ĝi amas per sia tuta memo, nenio mankas tie, kie estas tuto. Pro tio, tioma amo estas vera geedziĝo, ĉar se tiom ĝi amas, certe ne ete ĝi estas amata. Vera, kompleta geedziĝo konsistas en kunsento de ambaŭ; escepte se iu dubus pri tio, ke la animo estis de la vorto amata pli antaŭe, kaj pli multe.

(ellatinigis B. Cadei)

NUR POLVO MI ESTAS

Nenio mi estas, krom pulver' en infinito.
Nur vort', nur kant', nur unu humoro.
Kuregas vivo, kaj se venos morgaŭo,
eble mi jam ne estos inter vivantoj.

En sovaĝa homamaso tumulto,
kiu scias, ke mi vivas ankoraŭ?
kiu bedaŭras, se plu ridetas mia buŝo?
kiu bedaŭras, se ĉion lasas mi ĉi-tie?

Formortas la morto, forpasas la kanto,
forflugas ĉiu kolora humoro,
kaj el vivĉeloj kaj songbildoj
nur falinta polvo restadas.

Pri du grandaj Diaj misteroj,
pri vivo kaj morto ofte mi pensas,
kaj ĉiutage mi sentas senĉese,
ke mi nenio, nur polvo mi estas.

Deziderio Teleky, Rumanio

PRI LA PAPO EN SLOVAKIO

En la 8-9a numero de EK frato M. Šváček akribis pri la historie signifoplena vizito de la Sankta Patro en Prago kaj Velehrad la 21an de aprilo 1990. Por kompletigi tiun ĉi neforgeseblan eventon, kaj por alproksimigi ĝin al niaj legantoj, ni daŭrigas la priskribon de la papa vizito en Slovakio.

La 22an de aprilo la Sankta Patro Johano Paŭlo la Dua forflugis el Velehrad per helikoptero al la tria loko de sia dutaga vizito: al la ĉefurbo de Slovakio, Bratislava. Antaŭ alveno al la flughaveno Vajnory la Papo sendis sian benon el la aero al la konata pilgrimloka baziliko Ŝaŝtín en okcidenta Slovakio.

En la flughavena areo atendis preskaŭ unu miliono da pilgrimantoj, alveturintaj per proksimume 13.000 aŭtobusoj kaj 68.000 personaj, eventuale ŝargaj aŭtomobiloj. Post sia alteriĝo la Sankta Patro unue kisis la slovakan teron. La televido kaj radio detale prezentis la tutan programon, por ke la tuta loĝantaro povu vidi kaj aŭdi tiun ĉi unikan okazaĵon. Dum la



La Papo kisas la slovakan teron

solena sankta Meso kantis 1.500-membra kantĥoro, kunlaboris 100-membra muzika grupo kaj ĉeestis multaj honoraj ŝtataj reprezentantoj, grandaj grupoj da ordenaj fratinoj kaj fratoj. La sanktan Komunion disdonadis dum la diservo 1.000 pastroj. Antaŭ la tribuneno kun altaro estis starigita 15 metrojn alta kruco.

Je la kvina kaj duono posttagmeze, post kiam la Sankta Patro en ĉeesto de la primaso de Slovakio - ĉefepiskopo Jàn Sokol - ĉirkaŭveturis per papaŭtomobilo la grandspacan areon de la flughaveno, komenciĝis la sankta Meso.

En sia homilio la Sankta Patro parolis pri kredo. Li substrekis la historian fakton, kiam la slava regnanto Rastislav (en la jaro 863) invitis la du sanktajn fratojn el Saloniko, Konstantenon-Cirilon kaj Metodon, al la teritorio de la hodiaŭa Slovakio. Tiuj du fratoj - daŭrigis la Sankta Patro en sia prediko " kreis vian skribon, kompilis la gramatikon kaj tradukis la Sanktan Skribon kaj la liturgiajn librojn, donante tiamaniere la fundamentojn de via kulturo. Ekde tiuj tempoj la kulturo kaj la vivo de Slovakoj en siaj multflankaj esprimoj estas signitaj per kristana kredo, kiu trapenetradis ilian tutan historion kvazaŭ vivodona akvo, kvazaŭ mistera limfo, certiganta la kreskadon kaj floradon de la arbo, portanta riĉajn fruktojn de sankteco, laboremo kaj fideleco. Brile tion esprimas la sanktuloj Gorazdo, Bistriko, Andreo-Svorado kaj la ermito Benedikto. Signifoplene atestas tion la martiroj de la urbo Košice. Atestas tion tutaj generacioj, kiuj ekde tiam ĝis hodiaŭ konservadis la akceptitan kredon, protektis ĝin dum jarcentoj, transdonante ĝin sendiflektita al la patroj kaj al la filoj".

La pontifikan sanktan Meson kuncelebris kun la Sankta Patro 30 episkopoj. Dum la diservo la Papo benis 200 fundamento-ŝtonojn por la nove konstruotaj preĝejoj en Slovakio. Antaŭ la beno fine de la sankta Meso la Sankta Patro finsalutis ĉeestantojn kaj neĉeestantojn, ekumene ampleksante ĉiujn kredantojn en Kristo.

" Prago, Velehrad, Bratislava: tri mallongaj ekhaltoj, tri okazoj por mallonga renkontiĝo, sed tiom da homaj vizaĝoj, tiom da personoj. Kaj malantaŭ la ĉeestantoj ankoraŭ tiom da neĉeestantoj, kiuj ne troviĝas ĉi tie pro diversaj kaŭzoj. *Ĉiujn mi portas en mia koro.* Speciale tiujn, kiuj estas kun ni unuiĝintaj en la kredo je Kristo kaj je unusola Dio. Multaj aferoj kunigas nin kaj kondukas nin al tio, ke ni estu kune kaj ke ni eĉ vivu kaj laboru kune. La anstataŭanto de Petro volas al ĉiuj prediki nur



Kristanaj reprezentantoj dum la papa vizito

Jesuon Kriston, kiu mortis kaj resurektis, Lian veron kaj Lian amon. En tiu ĉi spirito mi salutas vin ĉiujn. Mi esperas, ke tio ne estas *« adiaŭ »*, sed *« ĝis revido! »*.

Tiu ĉi unika vizito de la Sankta Patro signifas novan historian epokon en Ĉeĥa kaj Slovaka Federacia Respubliko. Ni ne ĉesas esprimadi nian dankon al Dio pro la religia libereco, pro la reakiritaj eblecoj plene vivi dignan homan vivon - kaj pro la donaco nemeritita - vizito de la Sankta Patro en ambaŭ niaj respublikoj.

Dr. Magda Šaturová, Ĉeĥo-Slovakio

S

SOFORO: Homo kiu, vidinte trafik-akcidenton, aŭtomobilas singarde dum kelkcent metroj (*Anonimulo*)

SPAREMO: Mirinda virto de niaj antaŭuloj (*Anonimulo*)

« Vere mi ekkomprenas, ke Dio ne partiemas
je iuj personoj, sed en ĉiu ajn etno,
la Dion timantaj kaj juste agantaj
estas de Li akceptataj »
(Agoj 10:34-35)

Kial Asizo?

Ĉar, en tiu itala urbo naskiĝis kaj vivis Francisko (1181-1226), la malriĉuleto, kiu eminente praktikis kaj disvastigis universalan, eĉ kosman fratecon. Lia salutesprimo estis: *“Al ĉiuj loĝantoj en la tuta mondo mi, frato Francisko, malgranda ulo kaj servanto, deziras pacon el la ĉielo kaj sinceran amon en la Sinjoro Dio”*. Eĉ dum la krucmilitoj, kiam kristanaj armeoj akre batalis kontraŭ islamanoj, Francisko sin prezentis milde



Ekzistas ankaŭ nekatolikaj franciskanaj monaĥoj: jen kelke da ili (temas pri anglikanoj) en Londono, Britio

kaj humile al la egipta sultano, parolante pri Dio kaj Jesuo Kristo; kaj la islama suvereno lin respektis kaj honoris.

La krucmilitoj apartenas al forpasintaj epokoj, sed malpacoj kaj perfortoj iel ligitaj kun religiaj diversecoj estas bedaŭrinde ankoraŭ aktualaj: hinduistoj kaj sikoj en Hindio; kristanoj, islamanoj kaj druzoj en Libano; islamanoj kaj kristanoj en la kaŭkazaj sovetiaj respublikoj; kaj tiel plu ... Ofte tiaj malpacoj havas politikajn aŭ sociajn bazojn, kaj estas kondamnataj de la religiaj respondeculoj; tamen la skandalo restas.

La dialogo inter la religioj

En ĉiuj epokoj ne mankis grandaj animoj kiuj strebis al interreligiaj toleremo kaj dialogo, sed ĉefe en la lasta jarcento tiu idealo konsciigis pli vastajn homrondojn. Inter la unuaj provoj ĉi-sence menciindas la t.m. Monda Parlamento de Religioj (*angle World's Parliament of Religions*), kunvenigita en Chicago (Ĉikago), Usono, lige kun la 4-a jarcento de la malkovro de la amerika kontinento. La Parlamenton lanĉis la presbiteriana kaj katolika eklezioj de Usono, kaj funkciis 17 tagojn, ekde la 11-a ĝis la 17-a de septembro 1893, kaj ĝin partoprenis pluraj centoj da religifakuloj: monaĥoj, pastoroj, misiistoj, historiistoj, filozofoj.

Celo de la Parlamento estis instigo al paca interŝanĝo de ideoj kaj sentoj pri la diversaj religiaj travivaĵoj. Ameriko intencis per tio prezenti al la mondo modelon de toleremo: montri ke la kvereloj kiuj kaŭzis malpacojn en Eŭropo, ne plu daŭras en Ameriko; pruvi ke konkordo inter religioj estas ebla kaj dezirinda; kaj ke senreligieco kaj materiismo kontraŭas al la fundamentaj homecaj ideoj.

La inaŭguran ceremonion partoprenis ĉirkaŭ 4000 homoj. La reprezentantoj de la grandaj religioj eniris procesie, vestitaj per religiaj ornatoj. La "patro-nia"-preĝo, akceptita de ĉiuj, estis recitata ĉiumatene de la asembleo. La ferma kunsido kunvenigis 10.000 homojn, kaj estis vere triumfa.

Ni rimarkigas, ke ĝuste en tiuj jaroj Esperanto komencis sian aventuron, kun similaj idealoj, kiel evidentiĝas interalie el la Zamenhova *Preĝo sub la verda standardo*, kies unuan kaj lastan strofon ni citas:

*Al Vi, ho potenca senkorpa mistero,
Fortego, la mondon reganta,
Al Vi, granda fonto de l'amo kaj vero
Kaj fonto de vivo konstanta,
Al Vi, kiun ĉiuj malsame prezentas,
Sed ĉiuj egale en koro Vin sentas,
Al Vi, kiu kreas, al Vi, kiu reĝas
Hodiaŭ ni preĝas.*

*Kuniĝu la fratoj, plektiĝu la manoj
Antaŭen kun pacaj armiloj!
Kristanoj, hebreoj aŭ mahometanoj
Ni ĉiuj de Di' estas filoj.
Ni ĉiam memoru pri bon' de l'homaro,
kaj malgraŭ malhelpoj, sen halto kaj staro
Al frata la celo ni iru obstine
Antaŭen senfine!*

En la interreligiaj rilatoj oni pasis el malŝato al tolero ĝis respekto. Ĉi-teme la Koncilio Vatikana Dua deklaris (1965):

« La katolika eklezio nenion rifuzas el ĉio kio estas vera kaj sankta en ĉi tiuj religioj. Ĝi konsideras kun sincera respekto tiujn ag- kaj viv-manierojn, tiujn ordonojn kaj instruojn, kiuj, kvankam plurflanke diferencaj ol tio kion ĝi instruas kaj proponas, tamen ne malofte reflektas radion de tiu vero, kiu lumas al ĉiuj homoj ».

La koncilia deklaro ne restis senefika: lokaj kaj internaciaj iniciatoj estis lanĉitaj. Inter ili menciindas la *islam-kristana Dialogo* en Tarabulus (Tripolo), Libio (1976), kun 500 partoprenintoj; la *Kolokvo pri Religio kaj homo* en Cochin, Hindio (1980), kun 250 partoprenintoj; la *Monda Kongreso de Religiistoj pri Etiko* en Tokio kaj Kioto, Japanio (1981). Al tio aldoniĝis reciprokaj vizitoj de kristanaj monaĥoj en Bangkoko (1968), Bangalore (1973), Srilanko (1980), kaj de orientaj monaĥoj en eŭropaj kristanaj monaĥejoj.

Intertempe formiĝis pluraj konstantaj organizaĵoj, inter kiuj eminentas la *World Conference on Religion and Peace (Monda Konferenco pri Religio kaj Paco)*, kiu aranĝis kunvenojn en Kioto, Japanio (1970), Leuveno, Belgio (1974), Princeton, Usono (1979), Nairobi, Kenjo (1980) ... Sed Asizo estis alia afero!

La tago de Asizo

Longtempe preparita, la Asiza renkontiĝo estis oficiale anoncita de papo Johano Paŭlo la 2a la 25-an de januaro 1986 en la roma baziliko de S. Paŭlo, je la ĉesto de reprezentantoj de diversaj nekatolikaj konfesioj kunvenintaj por la fino de la preĝo-semajno por la unueco de la kristanoj:

“ En ĉi tiu solena okazo, — diris la papo — mi deziras anonci ke mi estas iniciatanta oportunajn konsultojn kun la respondeculoj ne nur de la kristanaj konfesioj kaj komunumoj, sed ankaŭ de aliaj religioj de la mondo, por estigi kune kun ili specialan preĝorenkonton por paco en la urbo Asizo, kiun la karitatoplena figuro de S. Francisko transformis al centro de universala frateco ”

La 27-an de oktobro 1986 alvenis al Asizo reprezentantoj de pli ol sesdek religioj, konfesioj, komunumoj, sektoj kaj internaciaj religiaj organizaĵoj; katolikoj, ortodoksanoj, antikvaj (antaŭ-kalcedonaj) eklezioj, praktolikoj (malnov-), anglikanoj, protestantoj, hebreoj, islamanoj, budhistoj, ŝintoistoj, hinduistoj, sikoj, ĝainoj, zoroastranoj, afrikaj kaj indianaj tradici-religianoj, ktp.

Lanĉante la preĝo-tagon de Asizo oni zorgis eviti *malajn ekstremismojn*. Ĉe unu ekstremo estas la *integrismo*, la *demonigo* de ĉiuj religioj ekster la propra. Tio kondukas la *maltoleremo* kaj certe ne akceptas tiajn interreligiajn aranĝojn. Aliflanke staras la *relativismo*, *eklektismo*, *sinkretismo*, kiu kondukas al *kompromisemo* kaj *indiferentismo*. Kontraŭ tiaj ekstremismoj, oni pledis por *fideleco* al sia konscienco kaj kredo, kunigita kun *respekto* al la konsciencoj kaj kredoj de la aliaj kaj *konscio* pri nia komuna, frata homeco, kies fonto kaj celo estas plej supera Estulo, kiun ni nomas Dio.

La Asiza tago komenciĝis per la akcepto de la diversaj religianoj fare de la papo, kiu klarigis la sencon de la iniciato:

“La kunveno de tiom da religiaj estroj — li diris interalie — hodiaŭ estas per si mem invito al la mondo konsciigi ke ekzistas alia dimensio de paco, kaj alia maniero por ĝin akceli, kiu ne estas rezulto de intertraktoj, de politikaj kompromisoj aŭ de ekonomiaj marĉandoj. Ĝi estas rezulto de preĝado ... Ke ni venis ĉi tien, ne implikas ajnan intencon strebi al religia konsento aŭ marĉandi niajn religiajn konvinkojn ”.

Post la akcepto, la diversaj religianoj disiris en diversajn lokojn por aparta preĝado. La diverskonfesiaj kristanoj preĝis kune, ĉar, kiel emfazis siatempe papo Johano la 23-a, *“tio kio nin kunigas estas ege pli multe ol tio kio nin disigas ”.*

Fininte la apartan preĝadon, ĉiuj faris *pilgrimon* al komuna loko, simbolo al tio kio devus esti la komuna evoluo de la homaro; *“frateca vojaĝo, en kiu unuj reciproke akompanas la aliajn al la transcenda celo, kiun Dio destinas por ni ”.* En la komuna loko (la malsupra placo de S. Francisko) la pilgrimuloj, kiuj observis religian *faston* en la tuta tago, faris denove ne komunan, sed laŭvican *preĝon*. Jen fragmentoj de preĝoj:

Budhistoj preĝis jene:

« Ke ĉiuj estuloj, kie ajn ili estas, suferantaj korpe aŭ mense, ekhavu oceanon da feliĉo kaj ĝojo, per niaj meritoj ...
Ke la nudulo trovu vestaĵon, la malsatulo nutraĵon, la malesperulo esperon, daŭran feliĉon kaj prosperon ... »

Hinduistoj preĝis jene:

« Ho Dio, gvidu nin el iluzio al Realo
Ho Dio, gvidu nin el mallumo al lumbrilo
Ho Dio, gvidu nin el morto al senmorteco;
Pacon, pacon, pacon al ĉiuj;
Ni preĝpetas pacon en la ĉielo; pacon enĉiele kaj surtere;
pacon en la herboj kaj la plantoj; pacon en ĉiuj Diaĵoj; pacon al la tuta kreaĵaro ».



Konuna preĝado de islamaj migrintoj al Norda Italio

Islamanoj preĝis jene:

« En la nomo de Dio, Bonkora kaj Kompatema.
 Laŭdon al Dio, Sinjoro de la Universo, Bonkora kaj Kom-
 patema, Reganto de la Rekompenc-Tago ...
 Servantoj de Dio estas tiuj kiuj iras surtere en humileco kaj,
 kiam malklerulo sin turnas al ili, ili diras: Pacon! ».

Ĝainoj preĝis jene:

« Omaĝon al la plej Pura
 Omaĝon al la Liberiĝinto
 Omaĝon al la Majstroj
 Omaĝon al la Religiaj Instruistoj
 Omaĝon al la Tutmondaj Asketoj
 Armilon kiom ajn fortikan povas venki armilo pli forta; ta-
 men nenia armilo pli fortas ol senperforto ».

Ŝintoistoj preĝis jene:

“ Ĉeftasko de kredanta homo rilate la nuntempajn mondon kaj homaron devus esti: pli kaj pli firmigi sian solidarecan senton, por ke samaj estu la sinceraj preĝoj ...

Kvankam la popoloj vivas trans la maro, kiu ĉirkaŭas nin, ni kredas ke ĉiuj estas niaj fratoj ... ».



Ŝintoista ceremonio sur Fuji-monto (Japanio)

Sikoj preĝis jene:

“ Ĉiopova Dio, subteno de mia vivo-spiro, amiko de vidvoj, amiko de malriĉuloj, liberigu min el aflikto, kaj donu al mi pacon ...”.

Afrikaj tradici-religianoj preĝis jene:

“ Dio Ĉiopova ... Ni ĉiuj hodiaŭ vin preĝpetas unucele. Al nia mondo mankas paco. Nin ĉirkaŭas daŭraj militoj kaj konfliktoj. Ni bezonas pacon. Tio instigis la sanktan patron inviti ĉiujn mondajn religiojn kunveni por preĝi por paco ... Ke viaj benoj estu abundaj super favorantoj kaj laborantoj por paco ”.

Indianaj tradici-religianoj preĝis jene:

“ Mi preĝos por ke ni ĉiuj devontiĝu preĝi kaj aktivi por paco interne de niaj familioj, triboj kaj nacioj. Mi preĝas por ĉiuj miaj fratoj kaj fratinoj irantaj sur ĉi-nia Patrino Tero. Mi preĝos en mia lingvo ... sed antaŭ ol ekpreĝi, mi petas ĉiujn ĉeestantojn preĝi samtempe kun mi, ĉiu siamaniere ”.

Zoroastranoj preĝis jene:

“ Kiu preĝas, tiu sin turnas al Dio. Li sciu ke perforto estas radiko de ĉiuj mizeroj en la mondo. Ĉi tie komprenemo triumfu super miskompreno; paco triumfu super malkonkordo; sindonemo super indiferenteco; estimo super malŝato; vera parolo triumfu super mensoga parolo; triumfu la vero super la falso ”.

Hebreoj preĝis jene:

“ Nia Dio, kiu estas en la ĉieloj, la Sinjoro de paco kompatos kaj korfavoros al ni kaj al ĉiuj filoj de la tero, preĝantaj por favorkoreco kaj kompato, petante pacon, strebante al paco ...
Ho Sinjoro, kiu estas en la ĉieloj, donu pacon al la tero, donu bonfarton al la mondo, donu trankvilon al niaj hejmoj ”.



Hebreaj rabenoj

Kristanoj preĝis jene:

“ Sinjoro, faru min ilo de via paco:
kie estas malamo portu mi Amon
kie estas ofendo portu mi Pardonon
kie estas malkonkordo portu mi Unuecon
kie estas malespero portu mi Esperon
kie estas aflikto portu mi la Ĝojon
kie estas mallumo portu mi Brillumon.
Ho Majstro, faru ke mi ne celu:
esti konsolata pli ol konsoli
esti amata pli ol ami;
ĉar donacante oni ricevas
pardonante oni estas pardonata
mortante oni releviĝas por eterna vivo ”.

La fruktoj de Asizo


Rimarkinde estas ke en la Asiza tago okazis batalhalto de militoj kaj geriloj en preskaŭ la tuta mondo. La 27-a de oktobro 1986 instruis ke la religiemaj homoj estas packonstruantoj: aŭtentika religieco estas bazo de paco, kaj serioza konstruo de paco estas signo de vera religio.

Asizo estis la unua, eble la spirite plej intensa kunveno de religiestroj. La dua okazis la 3-an de aŭgusto 1987; temis pri la “ *Kulmin-kunveno de Hiei-monto* ” apud Kioto, Japanio, lanĉita de la 92-jara respektinda Eitai Yamada, okaze de la 1200-a jubileo de la fondo sur Hiei-monto de la nukleo de la japana budhismo. Ĝi estis forta daŭrigo de la “ Asiza spirito ”.

La tria preĝo-tago por paco okazis en Varsovio, Pollando, la 2-an de septembro 1989. Ĉi-okaze la papo ĉeestis per televida mesaĝo. Per citaĵo el ĝi ni resumas la sencon de la mirinda vojo, kiu komenciĝis en Asizo, pludaŭris en Hiei-monto kaj Varsovio, sed atendas pluajn paŝojn el ĉiuj bonavolaj religianoj, kun la helpo de Dio:

« Vi volis daŭrigi la vojon de Asizo, en spirito de strebado al paco per preĝado kaj interreligia dialogo ... Hodiaŭ en Varsovio, plenumiĝas alia etapo de ĉi tiu signifoplena irado de diversreligiaj homoj strebantaj al paco .. Necesas daŭrigi ĉi tiun strebadon al paco en dialogo kaj preĝado ... Mi bondeziras ke la voĉo de la homoj hodiaŭ kunvenintaj en Varsovio atingu la korojn de ĉiuj homoj kaj ilin konvinku trairi la vojon de dialogo kaj de intertraktado respektema al ĉies rajtoj! ».

*Battista Cadei, Italio
el "Evangeliaj Kajeroj"*



Budhismaj monaĥoj (kun kapaŭdiloj pro lingvaj baroj) dum ekumena kunveno okazinta en Bari (Italio) fine de septembro 1990, kiel daŭrigo de la kunveno en Asizo de 1986

KRISTNASK-ARBO 1947

La "rumana Kristnasko" de 1989, kun la falo de la Ceausescu-reĝimo, kortuŝis la mondon. En la unua datreveno de tiu evento, ni represas el *La Espero* el *Koreio* rakonton de rumana esperantisto, kiu koncernas rumanan Kristnaskon en la jaro 1947.

Estis dum vintra ferio de la jaro 1947. La patrino admonis min: "*Pre-nu Dorelon kaj iru kune al festkunveno. Estas ornamita bela abio, kaj oni disdonos al infanoj donacetojn kaj kantos kristnaskajn kantojn, la infano ĝojos, vi vidos...*".

Dorelo, sola mia nevo, estis tiam kvar aŭ kvinjara, lia patro estis pereinta dum la dua mondmilito. Por Dorelo mi estis "onklo-trunko", li adoris la fabelojn kaj kredis min ĉiopova. Ĉiun vesperon li endormiĝis en mia lito.

En festo-halo de la lernejo (ah, kiomfoje mi estis recitinta sur tiu scenejo "Imperiestro kaj Proleto" de la fame konata rumana poeto Mihai Eminescu!) ĉio ŝvebis en etoso de granda festo-tago. Festo-tago-spektaklo ... kaj io tute aparta: ia kuriozaĵo kaj demando, espero kaj timemo (en nia lando, post la konkero de la povo fare de la Rumana Komunista Partio, anstataŭ "Kristnask-arbo" la abio tradicia nomiĝis "Vintra arbo" kaj la Kristnasko kaj ceteraj kristanaj festoj nomiĝis "vintraj fest-tagoj"). Estis la unua "vintro-arbo" organizita de nova sindikato de nia minejo, finfine por ĉiam liberiĝinta!

Ĉio estis impona; la salono ĝemis sub la pezo de girlandoj interplektitaj el abiaj frondoj. Eĉ en la plej luksaj iamaj baloj neniam mi estis vidinta tian brilecon.

En la salono fariĝis mallumo. Estis ĉirkaŭ ni kvindek gepatroj kaj maturaj homoj kaj proksimume trioblo da infanoj, etuloj sub porlerneja aĝo. Aŭdiĝis sonoriletoj arĝentaj, kurteno lante leviĝis kvazaŭ palpebro de iu miraklo. Sur scenejo tronis abio: abio bele ornamita, verŝajne la plej bela kristnaskarbo, kiun mi havis okazon vidi dum mia tuta vivo. Vera mirindaĵo: koloraj ampoloj, globetoj brilantaj, girlandoj oraj kaj arĝentaj. De supre komencis flueti kortuŝa muziko el nevideblaj flutoj kaj violonoj, dume

grandaj sonĝaj neĝeroj komencis ŝvebi super la humila planko. Estis mi sentanta, kiel la koretoj de la infanoj malfermiĝas al la fabelo, kiu troviĝas tie, bela, ĉiela - multe pli bela kaj reala ol ĝi povus esti en tiuj malriĉaj kaj malsategaj jaroj postmilitaj en ĉiu domo, en la malgrandaj ĉambroj de la Kolonio, plenaj de zorgoj, multnombraj infanoj kaj mono ĉiam malmulta ...

Jen aperis la " Kristnask-Avo ", kun ruĝa kapuĉo, kun barbo blanka kvazaŭ neĝo, kun granda pakujo surdorse. La muziko susuris sordine, multnombraj okulparoj akvumiĝis pro emocio. Eĉ min, junan kaj lucidan profesoron pri materialismo historia, tio kion mi vidis sur la scenejo, mirigis - kaj kortuŝeco larmiga kaj eterna infaneco penetris en mian koron.

Kiam tiu sorĉado atingis tiun momenton fabelan, dum kiu la animoj de la infanoj renkontiĝis kun la miraklo kaj sonĝo, " Kristnask-Avo " per ia fremda prononco diris kun sia milda voĉo: " Mi venis de malproksime, el imperio de eternaj neĝoj ... kaj alportis por vi amason da donacetoj ... ". Subite estingiĝis ĉiuj lumoj, kaj post daŭro de tuteca mallumo kaj konsterniga senmoveco, elektroampoloj en la salono denove eklumis violente. La milda " Kristnask-Avo ", forŝetante sian imponan kapuĉon ruĝan kaj la barbon blankan, descendis inter la spektantojn, obtuze rikanante kvazaŭ pro tre ŝatata ŝercaĵo, kaj salutis nin proletare per levita pugno:

" Karaj infanoj, kiel vi vidas, Kristnasko-Avo ne ekzistas. Mi estas Bazilo K... de sekcio mineja, kie oni preparas karbo-briketojn, kaj nun mi alportis por vi donacojn de laborhomoj ... Vivu nia sindikato libera! "

Tuta ĉeestantaro ŝtoniĝis. La plenaĝuloj, sed precipe la etuloj, kvazaŭ iliaj animoj estus tuj kovritaj per nigra, malamika glacio. La silento, kiu sekvis, estis tiom peza, ke ektimis eĉ mia estinta kolego de elementa lernejo, Bazilo K... Per strangola voĉo li provis kriaĉi iun sloganon (alie li estis sincera, bona kaj honesta; ankaŭ li havis en la salono infanojn; verdire, tre saĝa li ne estis). Vane. La timo profunda, paralizanta, daŭris.

Mi sentis Dorelon apud mi tute paliĝinta. Mi vidis liajn okulojn elorbiĝintaj pro timo kaj li terure timtremis. Mi ne povas rememori, kiom longe daŭris tiu paralizanta silento, kiam kvazaŭ estus krevinta la plafono, el la fundo de la salono komencis plorkrii unu infano; ne plori: kriegi kvazaŭ iu kuracisto vestita per blanka surtuto kaj kun granda injektilo en la mano direktus sin al li. Tuj, kvazaŭ iu akvo-baraĵo falus, tuta ĉeestantaro komencis ŝire ploregi. Ankaŭ Dorelo ploregis kriante. En tiu situacio neniu argu-

mento favora al " Kristnask-Avo " povis esti efika. Mi manprenis la infanon kaj ekiris hejmen.

Granda febro lin trafis kaj liaj okuloj ne sekiĝis. Estis ni ĉiuj plenzorgaj. La patrino desorĉis lin pro la timsorĉado, mia fratino alvokis doktoron ... Rezignante al filozofado, mi aliĝis al mia patro kaj al kelkaj najbaroj por batpuni Bazilon, la bestaĉon. Tia estis tiam la kutimo: se ni havis firmajn motivojn, ni rajtis punbati la " kamaradon ", indiferente, kian funkcion li havis en la minejo.

Ni trovis lin en drinkejo kun la okuloj bluŝvelintaj: jam faris tion aliaj homoj antaŭ ni. Li sidis sola ĉe unu tablo kaj ploris. Lia edzino estis forpelinta lin de hejme, la najbaroj blasfemis lin. Kiam li vidis min, lia vizaĝo sereniĝis; mi estis la " klerulo ", estis mi lia kolego tre instruita, klerulo, kiu scias, " kio kaj kiel " ...

" Klarigu vi al ili, diru al ĉi tiuj stultuloj, kiuj blasfemas min, ke oni povas fari revolucion sen timo, sen larmoj. Diru! "

Mi ne respondis al li. Mia patro mendis vodkon, ni eksidis ĉe la tablo kaj trinkis trakvilaj dum tuta vespero, en profunda silentado kaj trista komprenemo.

Ion d. Sirbu, Rumanio (el " La Espero el Koreio ")

PASLOĜANTO

En la pasinta jarcento, Usona turisto faris viziton al la fama Pola rabeno Hofetz Chaim.

Lin mirigis vidi, ke la hejmo de la rabeno estas nur simpla ĉambro plena de libroj. Nuraj mebloj esti tablo kaj benko.

" Rabeno, kie estas viaj mebloj? ", demandis la turisto.

" Kaj kie estas la viaj? " rebatis Hofetz.

" Ĉu la miaj? Sed mi faras nur viziton. Mi estas pasloĝanto ", diris la Usonano.

" Mi ankaŭ ", diris la rabeno.

La malgranda, sed " batalema " itala sekcio (Ueci - Itala Katolika Unuiĝo Esperantista) realigis lastatempe du gravajn aranĝojn: la 4a Kongreso en Foligno (je malmultaj kilometroj el Asizo) kaj publika solena memorigado pri Pastro Modesto Carolfi, ĉe la sidejo *Antonianum* de la franciskanaj pastroj en Bologna. (Bolonjo).

En Foligno partoprenis kvindeko da personoj. La episkopo de Foligno, Mons. Giovanni Benedetti, post kuncelebro de S. Meso (parte en la itala) kun pastroj Jacobitti, Longoni kaj Musazzi, restis en amikeca kaj amema interparolo kun la kongresanoj. La ĉeesto de loka episkopo dum Ueci-kongreso - ekde la restarto de 1987 - neniam mankis. Dum bonfara aŭkcio oni kolektis 1.070.000 italajn lirojn (900 us.dol.) uzotajn por la diversaj bonfaradoj realigitaj de Ueci, kelkaj kunlabore kun Ikue. Fakte la jara-sembleo de Ueci aprobis rezolucion per kiu oni starigas fonduson cele al



Kuncelebrado en S. Maria degli Angeli



Historia bildo: pastro Carolfi (*maldekstre*) kaj kard. Lercaro (*dekstre*)

financado, rekta, senpera, flanke de la esperantistoj, de lernejo en evoluanta lando, kiel atesto de nia amo kaj kiel kontribuo de nia movado en la internacia jaro 1990 por la batalo kontraŭ analfabeteco (internacia jaro forgesata de la amaskomunikiloj ...).

En Foligno oni elektis, krome, la Centran Komitaton (estraron), en kiu partoprenos: Maria Busato Pisoni, Elisabetta Casagrande Berardi, Jonne De Angelis Bertozzi, Pastro Duilio Magnani, Mauro Ortelli kaj Carlo Sarandrea, plus la spirita asistanto, mons. Lorenzo Longoni, kies nomumo por trijara oficado estis aprobita en 1989 de Kardinalo Carlo Maria Martini, ĉefepiskopo de Milano, al kies diocezo apartenas Mons. Longoni.

Dum la Kongreso en Foligno okazis ĉiutagaj esperanto-mesoj, je la intenco de la ĉeestantoj kaj memore pri la forpasintaj samideanoj. Apartan kortuŝan momenton oni travivis dum la pilgrimado al Asizo: eblis diservi en esperanto interne de la "Porziuncola", en *Santa Maria degli Angeli*, ĝuste en la dometo kie vivis sankta Fancisko.

En Bologna, la 30-a de septembro estis la tago memore al Pastro Modesto Carolfi, franciskano, vivinta ekde 1884 ĝis 1958, fondinto, en 1920, de Ueci kaj aktivega samideano: dum sia esperantista vivo li gvidis pli ol mil esperanto-kursojn! 75 samideanoj el pluraj italaj urboj kunvenis en la prestiĝa, famkonata *Antoniano* de Bologna, por aŭskulti la prelegojn de Prof-ro Maria Sola pri la katolika esperanto-movado, kaj de Pastro Albino Ciccanti (unu el la "Fruktoj" de la esperanto-agado de P. Carolfi, samordenano) pri nia pioniro. Multaj intervenoj de ĉeestantoj, kiuj konis P. Carolfi persone, pliriĉigis la tutan trihoran kunvenon.

Ueci daŭrigas sian agadon (des pli mirinda se konsideri, ke al ĝi aliĝas apenaŭ 190 homoj). Jam preta estas la organizado de ĝia 5a Kongreso (en Fognano di Brisighella, 50 km de Ravenna, 14-18.6.1991), kaj aliaj iniciatoj baldaŭ sekvos.

C. Sarandrea

ORA JUBILEA PASTRECO DE EPISKOPO MIZIOLEK

23.6.1990 en la Katedralo de Varsovio (Pollando), Episkopo Władisław Miziołek festis sian oran jubileon de sacerdoteco. Partoprenis en lia S. Meso la varsovia Episkoparo kun la Primaso Kard. J. Glemp, kaj reprezentantoj de diversaj animzorgaj grupoj, kiujn li prezidis dum pluraj jaroj, konforme al sia devizo “*Ministrare*” (= Servi). Kaj lia servado ne estis facila, kiel ankaŭ la tempoj, en kiuj li devis vivi.

Li naskiĝis 16.12.1914 en la vilaĝo Kapira ĉe Bzuro, kie dum la unua mondmilito longe daŭris bataloj. Familio Miziołek apartenis al la batalantoj por liberigo de Pollando. La patro mortis, lasante ok infanojn, el kiuj la plej juna Władisław havis nur du jarojn. La tuta zorgo pri la edukado falis, do, sur la patrino.

La fundamentan lernejon li vizitadis en la naskiĝa vilaĝo, kaj la gimnazion en Lowicz; poste li aliĝis al la porpastra Seminario en Varsovio. La lasta jaro de studado estis speciale malfacila, ĉar ĝi komenciĝis dum la ger-



La varsovia katedralo post bombado

mana agreso kontraŭ Pollando. La subdiakonaton li ricevis en la varsovia Katedralo la 23-an de septembro 1939, dum bombado de la germanaj aviadiloj. La konsekron plenumis Episkopo Stanisław Gail, kiu dum la bombado ordonis al la seminarianoj forlasi la Katedralon, celon de la atako, mem tamen ne foriris de la altaro. Tio fariĝis kvazaŭ simbolo por la pastroj, ke ili ne devas cedi el sia posteno, eĉ se minacas ilin grava danĝero. Post la soleno Varsovio estis venkoprenita de la germanoj, multaj seminarianoj perdis la vivon, kaj aliaj estis arestitaj dum du semajnoj. Tamen la pastreco de Władisław maturiĝis, kaj li ricevis la diakonaton sekrete, en privata

kapelo de la Episkopo. Li pastrigis en iom rekonstruita Katedralo, 23.6.1940.

La unuajn jarojn de animzorga laboro pastro Miziołek travivis en Ka-
êvo kaj Miedzulesie; en 1950 il komencis labori en la porpastra Seminario,
unue kiel prefekto, poste kiel rektoro. Li episkopiĝis 19.2.1969, kaj akcep-
tis la paroĥon S. Aleksandro sur la Placo de Tri Krucoj; tiam li ankaŭ
akceptis la postenon de estro de la Episkopara Komisiono pri Ekumenismo
kaj Ĝenerala Animzorgado en Pollando.

De tiu tempo datiĝas la kontaktoj de la Episkopo kun la esperantista-
ro. Pastro Paruzel sukcesis lin esperantigi, kaj la Animzorgado, kiu fondiĝis
en la krakova Katolika Inteligentula Klubo (1973) estis tuj aprobita. La
Episkopo mem partoprenis en kunveno de la Esperanto-sekcio en Krako-
vo, kaj de tiam en multaj aliaj lokoj de Pollando naskiĝadis aliaj katolikaj
esperantuoj. Tio estis des pli necesa, ĉar la tiama Pola Esperanto-Asocio
nuligis la katolikan sekcion en la kadro de tiu organizo. Tiamaniere la polaj
katolikaj esperantistoj ricevis agnoskon kaj rifuĝejon ene de ekleziaj istan-
coj. En Varsovio la esperantistoj ricevis gravan protekton de la Episkopo,
kaj la permeson celebri S. Meson en Esperanto en la preĝejo S. Aleksan-
dro, unufoje en la monato. Unufoje en la jaro la Episkopo mem celebris la
S. Meson esperantlingve.

En 1974 komenciĝis regulaj Spiritaj Ekzercoj en Gostyn Poznanski,
kaj diversaj pilgrimoj al polaj sanktejoj. Ene de tiuj okazis la unua simpozio
honore al Beata Maksimiliano Kolbe en Niepokalanów (1974), en kiu par-
toprenis ankaŭ Episkopo Miziołek. Poste sekvis la IKUE-Kongresoj en Ro-
mo (1975) kaj Ĉenstoĥovo (1977 kaj 1987), en kiuj Mons. Miziołek aktive
partoprenis, celebrante kaj predikante en Esperanto. Al tio oni devas aldo-
ni gravan kaj malfacilan taskon, kiun li bonvolis akcepti, nome la estradon
de la Internacia Liturgia Komisiono, kiu zorgis pri la Meslibro en Esperan-
to. Mons. Miziołek donis gravan helpon en la afero, ankaŭ intervenante
persone ĉe la vaticanaj instancoj, inkluzive de la Papo.

Nuntempe Mons. Miziołek estas ne tro sana (oni enplantis en lin
elektran movigilon por la koro); malgraŭ tio, li daŭre laboradas.

La katolika esperantistaro sendas al la Episkopo ne nur siajn gratulojn
kaj dankojn, sed ankaŭ varmegan preĝon intence de lia sano.

(El letero de la Animzorgado de Polaj Katolikaj Esperantistoj)

PILGRIMO EN PODSKALIE

En belega naturo sub rokegoj staras malnova kapeleto kun Maria-statueto, al kiu jam multajn jarojn pilgrimadas kredantoj el la ĉirkaŭaĵo, por elpeti benon de nia Ĉiela Patrino.

Neforgeseblajn horojn travivis 14 fratoj katolikoj esperantistoj, kiuj alvenis preĝi por si kaj por nia movado. Tiuj kiuj eltenis tutan nokton preĝante kun Maria ŝian Filon, kun multaj kantoj, neniam forgesos la leviĝantan sunon, kiu trovis nin korpe lacaj sed anime refreŝiĝintaj. Kun sincera pieco ni partoprenis je kvar sanktaj Mesoj, kaj je la adorado, kiun preparis kaj gvidis patro Alojz Dlugi antaŭ la nokta Meso, kiun li celebris. La partoprenintoj kore dankas al patro Alojz, kiu tre ofereze zorgis pri ni esperantistoj, malgraŭ tio ke li havis multege da organizaj zorgoj, kiel ĉeforganizanto de la tuta pilgrimo. Ili deziras venontjare denove veni al ĉi tiu belega pilgrimloko saluti la Patroninon de nia IKUE-movado kaj de Slovakio.

(Raportis Martin Majtàn, prezidanto de la slovaka sekcio de IKUE)

❖ Ekde oktobro 1990, Vatikana Radio ŝanĝis horarojn kaj frekvencojn de multaj el siaj programoj (inkluzive de tiuj en Esperanto). Jen la detaloj por aŭskulti la Internacian Lingvon el RV:

dimanĉe h. 20.00

mezaj ondoj: kHz 1530 (m 196)

kurtaj ondoj: kHz 6248 - 7250 - 15210 - 17710 - 17730 - 21650

(m 48.01 - 41.38 - 19.72 - 16.94 - 16.92 - 13.86)

mezaj ondoj (por Romo): kHz 526

frekvenca modulado (por Romo): mHz 93.3 - 96.3 - 103.8 - 105

ĵaŭde h. 05.40

mezaj ondoj: kHz 1611 (m 186)

kurtaj obdoj: kHz 7365 - 15210 (m 40.73 - 19.72)

Ĉiuj horoj laŭ Universala Grenviĉa Tempo.

❖ Validas, jam de kelkaj jaroj, interkonsento inter IKUE kaj KELI, kiu ebligas al la membroj de unu el la du asocioj aliĝi duonpreze al la alia.

Iusence, la fakto ke KELI-ano povas aliĝi al IKUE (kaj inverse) per duona kotizo, konsistigas kunligan ponton: ĝi signifas la rekonon, ke oni devas strebi atingi unuecon, kaj ke la komuna kristana elemento superregas ĉiajn administraĵojn ...

Krome, per ĉi tiu interkonsento *Dia Regno* kaj *Espero Katolika* atingas legantojn en landoj kie evangeliismo (respektive, katolikismo) ne estas multe disvastiĝintaj, kontribuante al pligrandigo de la reciproka kono, ankaŭ rilate la movadan flankon.

IKUE-anoj povas aliĝi al KELI pagante la egalvaloron de 12,50 nederlandaj guldenoj al la Landaj Rezentanoj de IKUE, aŭ 8.500 lirojn rekte al la Centra Oficejo en Romo; KELI-anoj povas aliĝi al IKUE pagante 21 guldenojn al KELI (van Hogendorplan 4, NL-3135 CD Vlaardingen, Nederlando, poŝta konto 5506132).

❖ HEROLDO DE ESPERANTO, la plej ofta kaj populara sendependa internacia gazeto en Esperanto, estas de 70 jaroj je la servo de la Internacia Lingvo. 16 numeroj jare, ilustritaj raportoj el la tuta mondo, diversaj rubrikoj, kalendaro, duobla Kongresa numero ktp. *Baza jarabono 43 ned. guld.* Mendu provokzempleron ĉe la redakcio: *A. Fighiera-Sikorska, Via N. Sandre 15, I-10078 Venaria R. (Torino), Italio.*

KORESPONDE

“ El Rumanio ”

Mi tre dankas pro sendado de la numeroj 1-6 de la revuo “*Espero Katolika*”. Dume verdire mi ne kapablas pagi ĝin ... Interesa estas via revuo, ankaŭ dank’ al fotografiaĵoj. Tuj allogis min “*Dudek jarcentoj de kristanismo*”, “*Monteto de krucoj, la sankta loko de litovoj*”, “*Medito al psalmo ...*” (en ĉiu numero), “*Legendo pri amo*”. Inter poeziaĵoj tre simpatia estas “*Pasero plendas*”.

Ni ankoraŭ ne sukcesis lanĉi nian gazeton ...

Macovei Nicolae, Rumanio

IKUE LIBROSERVO

1) " Biblio ", plaste bindita.	40.000
2) " La Nova Testamento ", bindita (elĉerpiĝas).	8.000
3) " La Nova Testamento ", poŝa formato	5.000
4) T. à Kempis, " La Imitado de Kristo ", bindita.	6.000
5) G. Gàrdony, " La sklavo de Dio "	6.000
6) " Katolika preĝaro "	2.000
7) J. Korytkowski, " Internacia lingva komunikado en la Eklezio kaj nuntempa mondo "	5.000
8) J. Korytkowski, " La Chiesa e il problema della lingua ausiliare internazionale ", itallingva eldono	2.000
9) J. Korytkowski, " La Iglesia y el problema de la lengua auxiliar internacional ", hispanlingva eldono	6.000
10) N. Van Doornik, " Francisko el Asizo, profeto por nia tempo "	10.000
11) S. Riabinin, " Sankta Francisko - poeziaĵoj "	5.000
12) Papo Paŭlo 6-a, " La vojoj de la Eklezio "	5.000
13) Episkopo W. Miziolek, " Enkonduko al ekumenaj problemoj "	4.000
14) R. Follerau, " La libro de la amo "	5.000
15) J. Dobraczynski, " La dia avarulo (P. Maksimiliano Kolbe) "	7.000
16) " Decimila Katalogo de la planlingva literaturo ĉe la Katolika Universitato de Lublino, Pollando "	5.000
17) " Katalogo de Esperanto-periodaĵoj ĉe la Universitata Biblioteko de Katolika Universitato en Lublino "	1.000
18) " En la lumo de la Biblio ", prelegoj de la Ikue-Kongreso en Dalfsen	4.000
19) Erwan Ar Menga, " Dio estas amo "	5.000
20) Erwan Ar Menga, " La ŝuisto de Gwidel "	5.000
21) Nebinditaj jarkolektoj de " ESPERO KATOLIKA ":	
jaroj 1980-1985 po	10.000
jaroj 1986-1990 po	15.000
22) " Preĝo de Sankta Francisko ", sur luksa papero, kolora	2.000
23) Koloraj bildkartoĵoj, " Himno de la Kreitaro " (10 diversaj)	3.000
24) Koloraj bildkartoĵoj, " Nia Sinjorino de la Espero " (10 ekzempleroj)	2.000
25) Koloraj bildkartoĵoj, " Sankta Francisko " (2 diversaj)	400
26) Bildkartoĵoj " Radio Vatikana " kun skribaĵoj en Esperanto (4 diversaj)	400
27) Bildkartoĵoj " Laŭdo al la Sinjoro pro la sociaj komunikiloj " po	200
28) Bildkartoĵoj por raportoĵoj pri aŭskulto de kurtondaj radioelsendoj. po	200

Mendu skribante al: Centra Oficejo de Ikue, Via Francesco Berni 9, I-00185 ROMA RM, Italujo
(telefonnumero: +39/6/70.00.323)

Ĉiuj prezoj en italaj liroj. Al ili aldoniĝas la poŝtaj kostoj. Oni pagas post ricevo de la menditaj aĵoj. Pagojn oni faru prefere per la poŝta konto numero 23 29 00 00, laŭ la adreso " Centra Oficejo de Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista - Roma, Italujo", aŭ per poŝta mandato (se oni pagas per banko, oni aldonu 5.000 lirojn por la ekstraj kostoj, kaj oni adresu la pagon al " Antonio De Salvo, ĉe Ikue, Via Francesco Berni 9, I-00185 Roma, Italujo"). Oni povas ankaŭ pagi al la Landaj Rezentantoj de Ikue en nacia mono.

Al tiuj, kiuj aĉetos librojn je almenaŭ 30.000 liroj, ni sendos donace libreton.

Por sendi monon al IKUE oni bonvolu uzi unu el ĉi tiuj rimedoj:

1) pere de niaj Landaj Rezentantoj (kies adresoj kutime aperas en la lasta paĝo de ĉi tiu revuo);

2) per la itala poŝta konto 23290000, laŭ la adreso: Centra Oficejo de IKUE, via Berni 9, I-00185 Roma RM, Italio (la pago devas esti esprimata en italaj liroj!); el multaj landoj estas eble sendi monon al tiu poŝta konto, sen komplikaĵoj;

3) per internacia poŝta mandato, laŭ la adreso: Antonio De Salvo, via Berni 9, I-00185 Roma RM, Italio (ankaŭ en ĉi tiu kazo, la pago devas esti esprimata en italaj liroj);

4) per itala banka ĉeko, aŭ per internacia banka ĉeko pagebla en Italio; la nomo estu: Antonio De Salvo, via Berni 9, I-00185 Roma RM, Italio (se la ĉeko estas je nomo de IKUE, ĝi estas praktike ne enkasigebla); la pago povas esti esprimata en iu ajn komercebla valuto; por ĉiu internacia ĉeko, oni aldonu 5.000 italajn lirojn aŭ egalvaloron pro bankaj kostoj;

5) per bankaj biletoj, en iu ajn komercebla valuto;

6) per la konto de IKUE ĉe U.E.A. (kodo: lkue-v).

ENHAVO

KRISTANE

- 171 Feliĉa estas tiu, kiu spertas la pardonon de la Eternulo
(*Th. Rotthaus*)
- 172 La helpo de Dio
- 173 Remalfermo de preĝejo en Ukrainio
(*L. Kolesnikov*)
- 174 Dudek jarcentoj de Kristanismo
- 176 Kunmetaĵo
(*A. Aversa*)
- 177 900 jaroj de naskiĝo de sankta Bernardo de Clairvaux
(*A. Gucwa*)
- 178 La vera amo
(*Bernardo De Clairvaux*)
- 179 Nur polvo mi estas
(*D. Teleky*)
- 180 Pri la Papo en Slovakio
(*M. Šaturová*)

EKUMENE

- 183 Asizo: ĉu paco inter la religioj?
(*B. Cadei*)

HUMANE

- 193 Kristnask - arbo 1947
(*I.d. Sirbu*)
- 195 Pasloĝanto

MOVADĖ

- 196 Tre aktiva la itala IKUE-sekcio
(*C. Sarandrea*)
- 198 Ora jubilea pastreco de Episkopo Miziołek
- 200 Pilgrimo en Podskalie
(*M. Majtan*)
- 200 Movadaj informoj

KORESPONDE

- 201 El Rumanio
(*N. Macovei*)

Landaj reprezentantoj de IKUE

Oni pagu la abonkotizon al la landaj reprezentantoj, samtempe avertante pri tio la Centran Oficejon (por ke tuj estu en ordo la ekspedo de la revuo). La jara kotizo de membroabonanto estas 32 svissaj frankoj aŭ egalvaloro. Pro la daŭra ŝanĝiĝo de la kurzoj de valutoj, la sube indikitaj valoroj havas nur informan celon.

Argentino

Daniel A. Cotarelo Garcia
Paysandú 784
RA-1405 Buenos Aires

Aŭstrio

Walter Mudrak
Beatrixgasse 19/9
A-1030 Wien III
ŝil. 250

Belgio

Roger De Schepper
Doornstr. 22
B-2610 Wilrijk / Antwerpen
b. fr. 860

Brazilo

Euclides Carneiro Da Silva
rua Capit. Paulino Freire 366
BR-08-700 Magi das Cruzes/SP

Britio

Roderic Mc Dermott
5 Clapgate Rd.
WD2 5NF Bushey/ Herts
br. p. 13

Ĉeĥoslovakio

Miloslav Šváček
Tršická 6
CS-751 27 Penčice

Francio

P. Roger Degrelle
12, rue Estienne d'Orves
F-54490 Piennes
fr. fr. 140

Germanio

József Kondor
Alte Schloss-Str. 25
D-5450 Neuwied 21 - Engers
p.k. 113726-673
Ludwigshafen Rhein;
g. m. 39

Hispanio

P. Manuel Casanoves, CMF
Str. A.M. Claret 8
E-8500 Vic/Barcelona
pes. 2.400

Hungario

P. Lajos Kóbor
H-9484 Pereszteg

Italio

UECI
viale C. Zavagli 73
I-47037 Rimini FO
p.k. 11129475; lit. 30.000

Japanio

Hatiro Matubara
Namimatu-tyo 4/5
596 Kisiwada-si, Oosaka-hu
enoj 3.000

Jugoslavio

P. Prof. Franjo Gruič
Strossmayerov trg 5
YU-54400 Djakovo

Kanado

Kevin Doyle
1844 Sawmill Creek Cres.
Gloucester, Ont., K1T 2E6
kan. dol. 29

Kolombio

Jorge Velásquez G.
calle 54 no 56-12, apart. 201
Medellín

Madagaskaro

Roger Randrianekena
B. P. 14
Ambatondrazaka

Meksikio

P. José M. Claramunt
apartado postal 318
MEX-68000 Oaxaca, Oax

Nederlando

S. P. Smits
Dunantstraat 164
NL-2713 VC Zoetermeer
p. k. 685124; gld 42

Norvegio

Stefan Murak
Semsavn 166
N-1370 Asker

Novzelando

G. D. Raynor
49 Sunny Grove
Wainuiomata, Wgtn

Pollando

Franciszka Bardecka
Litewska 24/2
PL-30.014 Kraków

Portugallio

Portug. Esper. Asocio
rua Dr J. Couto 6 r/c A
P-1500 Lisboa 4
esk. 2.000

Sovetunio

P. Valerijus Rudzinskas
SU-234567 Lazdiu
raj. Rudimina, Litovio

Svislando

P. Francisko Bommer
Communauté Marianiste
rue du Collège 5
CH-1920 Martigny

Tajlando

P. Marcel Perray
G.P.O. Box 1846
Bangkok 10501

Tajvano/ Formozo (Ĉinio)

P. Ĉi-Sin Chouw Roch
St. Nicolas Church, Pinglin
2320 Taipei Hsien, Taiwan

Togo

M. Agbolo Messar
B.P. 13169
Lomé

Usono

P. Kevin Laughery
245 North Amos ave.
Springfield
IL-62702-4793
us. dol. 27 - aerpoŝte 34

Zairio

Nsimba Mfumu Ndongala
B. P. 1323
Kinshasa 1

